Konciza biografieto de ZHANG FUDE :

Zhang Fude (Virto) naskiĝis en 1950 en kristana familio. Diplomiĝis el Lanzhou-universitato (Fako: ĵurnalistiko). Emerita profesoro pri multmedia instruado kaj informotekniko. Memlernis Esperanton ekde 1980. Inter septembro 1983 kaj julio 1984 progrese studis Esperanton en Pekina Fremdlingva Instituto ĉe la “Tria Tutlanda altlerneja Esperant-instruista kurso”, fondita kune de Ĉina Eduka Ministrejo kaj ĈEL (Ĉina Esperanto-Ligo). Estas delegito de UEA ekde 1997, eksa konsiliano de ĈEL, vicprezidanto de Gansu-provinca Esperanto-Asocio kaj vicprezidanto de Lanzhou E-Asocio.

"Mi, naskiĝis en 1950/04/20, en kristana familio. De infanaj aĝoj mi jam bone konis pri preĝado, pri Sankta Biblio, pri psalmoj ktp. Ĉar mi kreskis en kapelo (preĝejo), dum ok jaroj, ĝis la nigra jaro 1958.

Iumatene en la jaro 1958, kiam miaj geavoj kondukis min kaj eniris en la preĝejon, oni obeigis ilin riverenci al la fotobildo de tiama ŝtata prezidanto Mao. La maljuna paro opiniis, ke tio estas idolservado kaj senhezite ĝin rifuzis (Ĉar mia avo estis fama pastro en la regiono kaj avino estis pia kristano). Pro tio ili pare enkarceriĝis. Oni kondamnis ilin per terura krimo “kontraŭi revolucion” po 12-jara servuto en malliberejo. (Fakte 20-jarojn por mia avino!)……"

Mi ŝatas prezenti kvin temojn por la prelegoj:
1.“La centjara historio de miaj geavoj (1886~1988)” (pri iliaj travivaĵoj kaj suferoj sub la japana militarismo kaj same de la Mao-epoko) .
2.“Esperanto kaj mi” (pri mia lernado kaj uzado de nia lingvo ekde la jaro 1980).
3.“Aspektoj de nia urbo Lanzhou, nunaj kaj estintaj” (kun fotobildoj kaj ppt, eble televidoj).
4.“Mi estis kamparano” (pri mia 1001-taga senmemvola travivo en malproksima kamparo).
5. “Masaĝo por plibonigi vian sanon” (laŭ ĉina tradicia medicino kaj mia sperto)

----